

## ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

### Jarkonferenco de ZK ROH de TŽ VŘSR

Sabate la 28.11.1958 okazis en la kafejo KLUB en Třinec la jarkonferenco de ZK ROH de "Třinecké železářny VŘSR", kiun krom kelkdekoj da delegitoj el klubaj rondetoj, orkestroj, ĥoroj partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la Centra Komitato de Revolucia Sindikata Movado, de Organizo de Metalurgia Laborantaro, de Ĉeĥoslovaka Radio, ĈSM kaj aliaj. K-do Jurczok, la sekretario de la Uzina Klubo, en elĉerpiga referato resumis la rezultojn en kultura, kleriga kaj artisma agado de la rondetoj.

Nin, esperantistojn, interesis unuavice la parto pri Esperanto-rondeto. K-do Jurczok diris: Anoj de E-rondeto ankaŭ nunjare organizis kelkajn prelegojn sub la devizo "Vojaĝado sen elspezoj" por laborantaro de nia fabriko kaj por lernejinfanoj. Prelegis k-do Vitek kaj Rudolf. La prelegoj estis ĉiam kompletigataj per valoraj koloraj filmoj kaj inter Třinec-anoj ili jam akiris sufiĉe nombran konstantan publikon.

Esperantistoj organizis ĉi-jare kvin aŭtobusajn ekskursojn, unu eĉ kvintagan, sub la devizo "Ni ekkonu nian patrujon". Ses membroj de la rondeto partoprenis Universalan Esperanto-Kongreson en Varsovio.

Ĉiu rondeto, orkestra kaj artisma kolektivo de ZK estis komisiita per kultura patronado al unu el brigadoj de socialisma laboro en la fabriko. Unusola E-rondeto daŭre kontaktas kun sia dekpersona brigado de socialisma laboro en mekanika laborejo kaj bone plenumas sian taskon.

E-rondeto ĉiujara organizas E-kursojn por komencantoj, progresantoj kaj por pioniroj, aranĝas konversaciajn rondetojn por pli spertaj esperantistoj, en kiu oni diskutas pri politikaj kaj klerigaj novaĵoj. Se estas necese, ili volonte helpas en la aranĝoj de la Klubo. En kunlaboro kun ZK de VŽKG E-rondeto eldonas bultenon "FAJREJO" por esperantista junularo kaj favorantoj en 800 ekzempleroj.

Ankaŭ financa rezulto de Esperanto-rondeto estas, kontentiga, kompare al aliaj, pli grandaj kolektivoj.

Kiel oni vidas laŭ la supra resumo, nia rondeto danke al oferemo de siaj membroj gajnis favoran pozicion en la kadro de ZK ROH de "Třinecké železářny VŘSR".

-po-

-----  
Kun profunda doloro ni sciigas al vi, ke JOŽKA STANĚK mortis.

En Praha, la 20.11.1959, mortis la konata esperantisto Jožka Staněk, naskita en 1918. Profesie li estis ĵurnalisto. Li ŝatis poezion, kiun li tradukadis kaj ankaŭ originale verkadis. La aŭtoro kaŝis sin sub la internacie konata pseŭdonimo "kata kano". La Internaciaj Belartaj Konkursoj honoris lin per du premioj. En Varsovio li ricevis la 3-

an premion por originala poezio ("Ĉo San, la malgranda japana pupeto"). Li aktivis en la Mondpaca Esperantista Movado, kies prezidanto li estis elektita en 1959. Ankaŭ nia "Fajrero" perdis tiel unu spertan kaj talentitan kunlaboranton.

En marto 1958, post morto de slovaka poeto, nacia artisto Ivan Krasko (pseŭdonimo de Ján Botto 12.7.1876 – 3.3.1958) Jožka Staněk tradukis lian poemon "Sklavo", kiun ni unuafoje en Esperanto prezentas al la publiko.

Ivan Krasko: S K L A V O

Tiu mi, en kies orelojn sonis kant' de l' patrin' - sklavino,  
neniam tiu ĉi kanto malaperos el mia animo.

Tiel malgaje sonis stranga timema kanto  
kaj milde flugis super nia neplugita kampo  
ĝis ĝi penetris en tremantan animon de l' infano.

Tiu mi, kiu maturiĝis sub vipo de l' sklavposedantoj,  
sub vip', per kies frapoj tage malfermiĝas vundrandoj,  
ke ilia kuracado estas tasko senfina.

Mia ĝiboklinita dorso jam rektiĝi timas,  
sed en malsupra rigardo fajrero kaŝa brulas...

Tiu mi, kiu atendas vokon de l' sonoril' frapita,  
ĉar malfacile morti al sklavo ne revenĝinta.

Nur tiam ekstaros mi firme, sango kolorigos vangon.

Ho, malgaje sonis kanto de la patrin'-sklavino.

Elslovakigis: kata kano

O. Kníchal:

Historia signifo de Zamenhof

(kelkaj pensoj)

La internacia vivo viglas ekde antikvaj tempoj, sed tamen pro limigita evoluo socia ĝi ne povis esti aplikata grandskale dum jarcentoj. La franca revolucio faligis monarkion kaj heroldis la alvenon de nova epoko sur la histori-scenejon. La fundaj ŝanĝoj estis ligitaj kun konstituo de burĝaj ŝtatoj komence de la pasinta jarcento. Surbaze de la ekonomiaj puŝoj (grava eltrovoj de teknika pensado) formiĝis tutmonde funkcia foiro. Kapitalisma epoko alportis samtempe naciliberigan movadon gvidatan de mezaj klasoj sub devizo batalakiri nacian memstarecon. Tiel kreskis la naciismo. En sia unua periodo ĝi estis pozitiva pro sia kontraŭfeŭda tendenco (Balkano). Man-en-mane kun la nacia progresis ankaŭ sociala liberigo (klarvide ĉ. 1848) sekve de interveno de la proletaro jam kiel klaso. Nacia korpuso ne estis kohera unuo. Burĝaro kaj proletoj rilatas antagonisme. En apartiĝo de ĉi tiuj du klasoj sin respegulis ankaŭ konceptoj ideologiaj. Ĝis hodiaŭ ekzistas paralele kosmopolitismo kaj proleta internaciismo. La plejparto de la homaro unuiĝas en grupoj. Por helpi al komuna agado Internacia Ligo de Laboristoj ĉe la kongreso en Lausanne 1867 (Svislando) decidis ellabori internacilingvan projekton. Oni konsideris ĝin celkonforma.

Antaŭ 100 jaroj precipe Pollando estis subpremo de la rusa kaj indiĝena

nobelaroj. La ribelo en 1863 estis venkobatita. En Eŭropo ĝi tiam estis lando plej suferanta de fremdaj inundoj, ekspluatata de registaroj, kiuj profitis el konfuza situacio. Ne mirinde, ke inter la civitanaro regis reciproka malŝata sinteno.

La objektivaj kondiĉoj por sukceso de la internacia lingvo estis:

1. Esperanto estigis sur teritorio, kie intergentaj kvereloj estis dolortuŝa demando. Ĝuste pro tio ĝi povis tie plene disvastiĝi en la 1-a jardeko.
2. En la 80-aj jaroj transiranta al la plej alta ŝtupo fariĝis tutmonda fenomeno; sekve ankaŭ ties institucioj (scienco, arto k.s.).

## Nia spegulo

### NOVAJ GRUPOJ EN BOHUMÍN KAJ HAVLÍČKŮV BROD.

En Bohumín, kie estas Esperanto-monumento kaj aleo de D-ro Zamenhof, daŭrigos la tradicion nova rondeto fondita ĉe la domo de kulturo. La fondon iniciatis s-anoj Trombala kaj Macura. Inkluzive de kelkaj gastoj el Ostrava vizitis la unuan kunvenon 15 personoj. La kurson por komencantoj gvidas s-ano J. Raška.

25.11.1959 fondiĝis Esperanto-rondeto en ZK de "Traťová distance ČSD" en Havlíčkův Brod. La 7-membran rondeton gvidas s. Stanislav Severa, fervojisto, Žižkova 494. La elementan kurson en Havlíčkův Brod (10 p.) kaj ankaŭ en Okrouhlice (OB MNV, 16 p.) gvidas Inĝ. J. Řebíček.

### SOLENA ZAMENHOF-VESPERO EN OSTRAVA KAJ OPAVA

16.12.1959 en Ostrava-Vítkovice okazis solena vespero honore al la Zamenhofa jubileo. En la programo sin majstre prezentis violonisto Václav Sebera, pianon ludis Lída Čermáková. Solenan rememoron faris Inĝ. Werner, deklamis Alena Zdražilová. Krome 50 ĉeestantaj esperantistoj havis okazon vidi kelkdekojn da valoraj diapozitivoj kun prihistoriaj eventoj en la movado (1907 – 1929), ankaŭ kelkajn bildojn de D-ro Zamenhof.

En la Kulturdomo de Petr Bezruč en Opava kunvenis 17.12.1959 ĉirkaŭ 25 gesamideanoj por honori D-ron Esperanto. Pri la jubileo parolis Prof. Pavel Šimoník. En artisma programo koncertis L. Čermáková kaj V. Sebera el Ostrava - kaj deklamis kelkaj junaj membroj de la rondeto en Opava.

### ATENTU! ESPERANTAJ MERKREDOJ EN OSTRAVA!

La rondeto en ZK VŽKG vin denove invitas al siaj merkredaj kunvenoj en Vítkovice, "Zámek",

(19,30). Jen la listo de programoj:

- 6.1. Mia plej interesa travivaĵo en 1959.
- 13.1. Kiado ĉe magnetofono (kvíz).
- 20.1. Unu jaron mi vivis en Ĉinio (s. Žídková)
- 27.1. KVAROPO - vespero de poezio.
- 3.2. Eta koncerto (L. Čermáková, V. Sebera)
- 10.2. Ekkonu vian patrujon! Kun lumbildoj.
- 17.2. Kun gitaro ĉirkaŭ la mondo.

- 24.2. Rememoroj pri la februaraj okazintaĵoj.
- 2.3. Vizite ĉe Voskovec kaj Werich. (ERINACO)
- 9.3. Artoj en malnova Egipto.
- 16.3. Kibernetiko kaj novaĵoj en elektrotekniko.
- 23.3. Eta koncerto.
- 30.3. Internaciaj politikaj rilatoj.

EN NIAJ GRUPOJ KRESKU MEMBRARO LAŬ KVANTO KAJ ANKAŬ LAŬ KVALITO!

Se malsufiĉas la fort'; laŭdindas tamen la volo. (Ovidius) G.P.

### ĈS. RADIO PRAHA PRI D-RO ZAMENHOF.

La 14. kaj 15. de dec. 1959 Radio Praha elsendis 23-minutan programon "Ĉu vi parolas Esperante?". Tiu ĉi plaĉa elsendaĵo estis aŭskultata de vasta publiko en la tuta Ĉeĥoslovakio. Elsendita: 14.12. per Praha I (21,20 h), 15.12. per Praha III (13,30h). Aŭtoro: Helena Wolfová (redaktorino de "Večerní Praha"). Reĝisoro: Josef Henke. Ludis: Kačírková, Vl. Leraus k.s.

Certe, ke vi danke skribis al la ĈS. Radio?

### PRI KAJ EN ESPERANTO EN SOVETUNIO.

Tiel estis motivita la ekspozicio en Žďár nad Sázavou, inaŭgurita 22.11.1959. Verkoj de rusaj kaj sovetaĵoj verkistoj en la Internacia Lingvo, tradukitaj aŭ originalaj. Pli ol 30 gazetoj en la lingvoj rusa, armena kaj estona kun artikoloj pri Esperanto. - Ĝi estis bela ago en la monato de ĉs.-soveta amikeco.

### DU ĈEFAJ TASKOJ.

Esperantistoj en Ostrava-Michálkovice (ZK de Petr Cingr) starigis antaŭ si du taskojn:

1. Al kiel eble plej multaj interesiĝantoj ebligi bazan ellernon de Esperanto kune kun bazo de ĝia ideologio kaj historio.
2. Profundigi la lingvajn sciojn de la rondetanoj, precipe sur la kampo de gramatiko kaj konversacio.

La rondeto jam havas 32 membrojn. El ili 14 atingis la lingvan gradon A, 10 B kaj unu sukcesis ĉe la ekzameno C, la kurson elementan vizitas 9 personoj.

### VIZITE EN KURSOJ DE ESPERANTO EN KYJOV.

En Kyjov ekfunkciis la kursoj por komencantoj (gvidas s. F. Svačina) kaj por progresantoj (gvidas s. F. Škrla). Estas interese, ke multaj kursanoj estas al vilaĝoj apud Kyjov. La A-kurso progresas entute bone, precipe s-inoj Aniĉka Šupová el Mutěnice, Miluška Drozdová el Dražůvky, Jiřinka Tierlingerová el Bukovany, Olga Šmídová el Kyjov kaj s-anoj Brázda el Skoronice kaj Musil el Bohuslavice. La progresantoj perfektigis en konversacio, gram. liter. kaj tradukado.

MALGRAŬ OBSTAKLOJ LA RIKOLTON NI ELBATALOS!

En Nové Zámky kuras 3 kursoj, januare komenciĝos novaj 3 por slovakoj kaj hungaroj. En la urbo estas multaj afiŝoj kaj 2 montrofenestroj pri Esperanto. Al SET 1960 sin jam preparas 20 personoj.

La Zamenhofan jubileon oni festis la 15.12. en la Distrikta Domo de Kulturo. Festparoladon la k-doj Bečka kaj Geleta.

### SE VI NE KREDAS – PROVU!

Pasintjare ni komencis grandegan laboron en la suda parto de Slovakio inter hungaroj, kie ĉe ili loĝas pli ol 700.000. En la komenco de nia agado tuj aperis unuaj kontraŭbatalantoj. Mi tuj decidiĝis skribi kelkcent poŝtkartojn al grandaj urboj de la mondo, de kie mi petis turist-presaĵojn en Esperanto aŭ en aliaj lingvoj por propagandi ilian landon ĉe ni. - Mi ricevis pli ol 300 belegajn paketojn el 42 landoj. Nun, kiel geografiisto, mi uzas la materialon tre sukcese en mia instruado. Se venas iu "saĝa" kontraŭulo, mi nur montras al li la flankendonitajn 300 kovrilpaperojn kun la enhavo, kaj se li ne komencas lerni Esperanton, li almenaŭ silentas.

Kara samideano! Sekvu la ekzemplon – havu same multe da ĝojo!

E. Geleta

### LA KUNLABORO INTER PÍSEK KAJ STRAKONICE.

La 13.12.1959 en Strakonice estis aranĝita la programo omaĝe al la aŭtoro de Esperanto. El la grupo en Písek venis 20 esperantistoj, kiuj ankaŭ kontribuis la kulturalan programon.

### Ĉ-E kaj E-Ĉ VORTAROJ DE RUDOLF HROMADA.

Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato laŭ la rekomendo de la vortar-komisiono aprobis la eldonon de ĉirkaŭ 80-paĝa vortaro de R. Hromada. Ĝi enhavas proksimume 6000 vortojn. Por la eldono kaj distribuado estis komisiita E-rondeto en la Domo de Kulturo en Jihlava.

### OMAĜE AL ZAMENHOF-JUBILEO - KONCERTOJ

BRNO. (12.12.) En la salono de Ŝtata konservatorio en Brno esperantistoj okazigis solenan koncerton el verkoj de Smetana, Händel, Wagner, Moniuszko, Puccini k.a. La programon gvidis kaj pianakompanis Prof. V. Scheiber, kantis Hana Svobodová kaj Radislav Chudoba (en Esperanto).

Orgensolajn ludis Lad. Koryčan, aŭskultanto Akademio de Muzikaj Artoj de Janáček en Brno.

PRAHA. (16.12.) La esperantistoj en Praha rememoris la jubileon per digna solenaĵo en ornamita klubejo! Paroladis D-ro T. Pumpr, E. Seemannová kaj Hanjo Bartošíková, malgrandan violoncelan koncerten prezentis D-ro P. Sádlo-Páv.

ZNOJMO. Honore al Zamenhof en Znojmo koncertis la Sudmoravia kvarteto.

### SAMIDEANO KURISU EN ĈEĤOSLOVAKIO.

Fine de 1959, invitive de ĉs. institucioj, venis al Praha la konata japana esperantisto kaj literaturisto KURISU. S-ro Kurisu pere de Esperanto konatiĝis siatempe kun kun ĈSR, japanigas pere de Esp-o ĉeĥajn verkojn (ekz. "La Avino" de

B. Němcová) kaj sufiĉe regas la ĉeĥan lingvon. La studrestadon de la ŝatata gasto en ĈSR daŭros duonjaron.

#### RILATOJ DE D-ro IMRE FERENCZY KUN ĈSR

D-ro Imre Ferenczy, junulara sekciestro de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro, faris mallongan viziton en Praha, en novembro. Por printempo 1960 la medicina fakultato en Olomouc invitis lin al kelksemajna restado por studi ĝiajn resanigajn metodojn je hepatmalsanoj.

#### ĈEĤA LITERATURO EN ESPERANTO.

El Jugoslavio oni sciigas, ke jam en januaro 1960 aperos tie Esp-a traduko de la poemkolekto "La Panjo" de J. Seifert. La traduko estas brila kaj venis el plumo de Jiří Kořínek.

En la nova libro "En bela subtera mondo", eldonita de "Stafeto", oni parolas ankaŭ pri ĉs. grotoj kaj pri Prof. Absolon.

"LIDÉ A ZEMĚ" (La Homoj kaj Tero) – decembra numero – enhavas longan, tre favoran recenzon pri la libro "Burka nad Akongauí" (Tempesto super Akongagvo) de T. Sekelj, tradukita de Ed. Tvarožek. La libro jam aperis en 12 lingvoj, en plej proksima tempo ĝi aperos ankaŭ esperantlingve, en Jugoslavio.

#### ESPERANTO EN LA GAZETARO.

Ni petas pri liverado de unu ekzemplero de ĉiu gazeto, precipe loka kaj regiona, en kiu estas menciite pri Esperanto aŭ lingvo internacia ĝenerale. La specimenojn ni bezonas por ev. mencio en "Fajrero" por nia arkivo kaj statistiko. Grupaj estraroj, helpu al ni!

Red.

## **LA MOVADO eksterlande**

#### LA ZAMENHOFA JUBILEO REMEMORITA EN USSR.

LENINGRAD. Ni ricevis 6-paĝan presitan invitilon (rusan-esperantan), en kiu la AKADEMIO DE SCIENCOJ DE USSR – Domo de Sciencoj je nomo de M. Gorkij invitas al du kunsifdoj, la 16-an kaj 17-an de decembro 1959, dediĉitaj al la centa naskiĝ-datreveno de L. L. Zamenhof. La kunsidoj kun parolado pri la aŭtoro de Esperanto kaj sciencaj prelegoj pri la internacia lingvo malfermis Prof. S. V. Obruĉev, Membro-korespondanto de la Akademio de Sciencoj de USSR. En belarta parto de la kunsidoj partoprenis i.a. N. N. Hytjkov, membro de la Komsomola Teatro en Moskvo.

MOSKVO. Solenan kunsidon honore al la jubileo de Zamenhof aranĝis 25.12. la Moskva Urba Domo de Instruistoj. La 24.12. Radio Moskva elsendis paroladon de Prof. E. Bokarev pri Zamenhof kaj Esperanto.

## "TEATR" PRIV E R D A Ĉ A R O

La soveta gazeto: TEATR mendis de la aktoro N. Rytjkov artikolon "Internaciaj teatroj". La aŭtoro mencias en la aperonta artikolo ankaŭ la artisman kolektivon "Verda Ĉaro de J. Baghy" en Praha kaj mendis por tiu celo el Praha fotografaĵojn el prezentadoj de la "Verda Ĉaro".

## DECEMBRA KRONIKO EL BUDAPEŝTO.

La 15.12. en "Kossuth Klub" de la Naturscienca kaj Popularscienca Asocio ties literatura kaj lingva sekcio aranĝis prelegon pri Esp-o kaj Hungario. Prezidis Prof.Imre Botos, paroladis k-do Z.Tiborc, kunlaboranto de la Ĉefurba Biblioteko.

Kulturvesperoj honore al Zamenhof okazis ankaŭ en la sindikata kulturdomo "Egressi Gábor", en Blindula Asocio, kie parolis kaj ludis fama pianisto Imre Ungár kaj en poŝtista fakrondo, kie fingvidis la kurson J.Baghy.

En solena memorkunveno de la Landa Packonsilantaro kaj la Landa Esp. Konsilantaro parolis k-do Harmati, sekretario de la Landa Popolfronto kaj k-do Jan Moszozenski, konsilanto de la Ambasadro de la Pola Popolrespubliko en Budapeŝto.

La Landa Packonsilantaro rekonis la gravecon de la Esperanto-movado. Pro bona agado jam du esperantistoj ricevis oran honormedalon kaj aliaj du fariĝis membroj de la Landa Packonsilantaro.

P.B.

## GRAVAJ SCIIGOJ EL BULGARIO

La 34-a landa esperantista kongreso okazos de la 9-a ĝis la 12-a de julio 1960 en malnova pitoreska bulgara urbo Tarnovo. En la kongresa programo oni antaŭvidas: laborkunsidojn, elekton de nova centra komitato, ekskursojn al vidindaj lokoj k.s. Bulgara Esperanta Teatro prezentos la komediojn "Ĉasantoj de oficoj" de I. Vazov kaj "Komedio de eraroj" de Shakespeare. La kongreson partoprenos 1200-1500 personoj, el kiuj ĉirkaŭ 200 estos eksterlandanoj.

Centra Konsilantaro de Bulgaraj Sindikatoj kaj Centra Komitato de Bulgara Esperanto-Asocio direktis instrukcian cirkuleron al ĉiuj sindikataj societoj kaj rekomendas al ili organizadon de Esperanto-kursoj por laboristoj. En la cirkulero estas i.a. menciite, ke Esperanto pro sia facileco povas estiĝi la dua lingvo de ĉiu bulgara laboristo.

Nova bulgara poŝtmarko kun Esp-a motivo jam aperis. En du verdaj kolornuancoj, kun portreto de Zamenhof, aperis en kvanto 100.000 ekz. Aŭtoro de la p. m. estas Boris Angeluŝev. Kontraŭ 2 resp.kup, liveras ĝin: Esperanto-societo "M. Gorkij", p.k. 44, Sofia, Bulgario.

En Sofio funkcias Centra Komitato de BEA kaj kvar societoj kun ĉirkaŭ 650 membroj. Por akiri dignan sidejon estis decidite elkonstrui Esperantan Kulturdomon. La Financa Ministerio permesis al la Konstrua Komitato presigi specialan glumarkobrikon, kiu valoras 1 levon. La eldonitajn 350.000 brikojn oni intencas vendi en la unua duonjaro 1960.

### FILMO PRI LA 44-a UNIVERSALA KONGRESO.

Konata samideano, filmreĝisoro Jean Forge Fethke, sendis al ni sciigon -24.10.-, ke li estas finanta la filmon pri la 44-a U.K. en Varsovio. Certe ĝi estos malofta spektaklo ne nur por esperantistoj, sed grava kaj moderna propagandilo por vasta publiko.

Dr. K.

### ESPERANTO INTER JUNULARO EN DDR.

En la decembra n-ro de "Germana Esperanto-Revuo" estas artikolo de P.G., el kiu ni represas: " ... eble plej forte nun evoluas la Esperanto lernado inter la junularo de la granda komerc-centro Leipzig, kiu evidente superis la regionon de Dresden. Ankaŭ el bela Harz-urbo venis ĝojiga raporto: Signifoplena estas la fakto, ke ankaŭ en du universitatoj kreiĝis studrondoj kaj korespondcirkloj inter la studentoj: Leipzig kaj Rostock."

### ESPERANTO EN LA KOMERCO, INDUSTRIO, TURISMO.

Antaŭ kelkaj monatoj la Milana Esperanto-Klubo starigis en Milano la "Centron por Esperanto en la Komercio, Industrio kaj Turismo", kiu celas enkonduki Esperanton en la ĉiutagan vivon kaj en la internaciajn komercajn rilatojn. Ĝia JARLIBRO estas internacia, adresaro de firmaoj, kiuj povas uzadi Esperanton en la interlandaj rilatoj. Adresoj estas publikigataj senpage. Adr.: "Centro", Milano, Piazza Oberdan 1, Italio.

### PAŜOJ EN NACILINGVAN GAZETARON

"DAILY WOKKER" (24.8.) J. Davidson en ampleksa artikolo akcentas avantaĝon de Universala Kongreso de Esperanto kompare kun la Festivalo en Vieno kaj similaj internaciaj aranĝoj, kie pro diverslingveco vera interkompreniĝo estas malfacila. Ni citas: "Laŭ mia opinio estas bedaŭrinde, ke laborista movado ĝis nun plene ne utiligas ĉi armilon (Esperanton – rim. de trad.), kiu povas forigi la barojn inter laboristoj de ĉiuj landoj kaj tre faciligi reciprokan kontakton.

E. Spitz

"POLITEĤNIK" (19.10.)- gaz.de Leningrada Politeknika Instituto je nomo de M.I. Kalinin. V.Bikin estas aŭtoro de la artikolo "Internacia lingvo". Ni citas: "Se homo krom sia gepatra lingvo scios Esperanton, en kiu ajn loko de nia planedo li ne sentos sin muta."

Jer.

"RIVISTA EUGANEA" (Italio) en la septembra numero uzis Esperanton por la artikolo de G. Saggiori "Euganea Montetaro kaj ĝiaj kuraĉlokoj". Espereble la eldonanto daŭrigos la informojn pri la bela regiono en Esperanto. (Adr.: "Riv. Eug.", Padova, Piazza del Santo, 14, Italio).

"FUNKCIALAJ EKVACIOJ" - la japana matematika revuo estas redaktata ankaŭ en Esperanto kaj aldonas esperantlingvan resumon al ĉiu artikolo.



"JOURNAL DE MEDICINE DE LYON" ankaŭ komencis aperigadi la resumojn en Esp-o. Kuracistoj kaj medicinistoj, gratulu al la redakcio ("J.M.L.", 52 rue Victor Hugo, Lyon 160-74, Francio).

"REVISTA BRASILEIRA DE GEOGRAFIA" - luksa brazila revuo jam ekde 1939 resumas la ĉefajn artikolojn en Esp-o. - Ankaŭ la Brazila Instiuto de Geografio kaj Statistiko akceptis Esperanton kiel sian korespondan lingvon kaj eldonis en ĝi jam 30 publikaĵojn.

"LA REVUO ORIENTA" raportas, ke post la lasta milito jam 50.000 japanoj lernis Esperanton. En 25 japanaj universitatoj ekzistas Esperanto-kursoj. Inter japanaj sciencistoj estas Esperanto konsiderinde disvastigita.

## LA ABONKONKURSO

La konkurson povas partopreni ĉiu, kiu gajnas novan abonanton por Fajrero. Ĉe taksado oni konsideros nombron de gajnitaj abonantoj.

KONDIĈOJ: Anoncu vin en administrejo (ĉe Vl. Kočvara) kaj

1. aŭ mem sendu la adresojn kaj kolektitan monon,
2. aŭ viaj varbitoj indiku vian nomon dorse de la pagilo sub "Zpráva pro příjemce".

La abonpago (nur presa subteno) estas 12 Kčs ne por la tuta jaro 1960 (6 numero). La pagilojn disponigas la administranto.

LIMDATO: 25.3.1960 – decidus la dato de poŝta stampilo.

REZULTOJ estas publikigitaj en la 2-a numero.

1. B. Prus: Faraono
2. I. Vazov: Sub la jugo
3. J. Baghy: Songe sub pomarbo
4. F. Szilágyi: Mistero minora
5. J. H. Rosbach: Homoj kaj riveroj
6. M. Ziolkowska: Doktoro Esperanto
7. Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko
8. Por nova afero nova maniero: Fajrero 1960
9. Gaŭ Ju-bau: Mi volis viziti lernejon; Faj. 60
10. Homo – ĉina bildkarta serio; Fajrero 1960
- 11.-20. Jarkolekto de Fajrero 1960

---

### UNU EL GLORAJ RIDETOJ

Honoré de Balzac estadis ofte sub financa premo. Foje nokte, kiam la pezaj zorgoj ne permesis al li ekdormi, li aŭdis, ke en lia skribotablo serĉe palpas ŝtelisto. Li malfermis ĉiujn tirkestojn kaj longe en ili serĉis. Balzaculaŭtride eksplodis: "Hometo", diris al la surprizita ŝtelisto, "vi serĉas ĉe mi monon nokte en mallumo kaj mi ne kapablas ĝin tie trovi eĉ tage en plena lumo.

# Ni diskutas pri informado

La diskuto pri la informado (aŭ propagando?) trovis ĉe vi konsiderinde grandan intereson. Pro limigita loko en tiu ĉi numero ni ne povas hodiaŭ fermi la diskuton. Ni publikigas nur aktualajn rimarkojn de la pseŭdonima Verda VAGANTO; en venontaj numeroj estas publikigitaj: Dr. Kočvara - Fondu publicistajn rondetojn!, J. Cink – Kion en la elmontran vitrokesteton?, plue sugestoj de E. Koblichke (DDR). J. Patera k.a. Pluajn diskut-kontribuojn ni ankoraŭ akceptas.

Red.

## EL NOTKAJERO DE VERDA VAGANTO

Mi foliumas mian notkajeron; ... peresperanta laboro, priespe... por... propagando – jes, pri propagando mi intencas diri ion. Sed, kion, mi nur volis... ha! jam mi kaptis la fadenon de miaj pensoj. Mi ne parolos pri propagando per- pri- por- esperanta, sed por-esperantista. Nu, hodiaŭ vere grava laboro. Ĉi jaro, la jaro Zamenhofa, estas tre riĉa je renkontoj de esperantistoj. Krom la oficialaj kongresoj, renkontiĝoj, kunvenoj kaj aliaj kun- kompreneble vizitadis sin esperantistoj ankaŭ persone, intime, nur por pridiskuti la signifon de la jaro, pluan jaron, propagandon ktp. Veraj esperantistoj sentas devon viziti ankaŭ samideanojn traveturante urbojn kaj vilaĝajn, okaze, ĉe diverscelaj urbovizitoj. Sed kio okazas? Nenio, ĉar ofte en tuta urbo ni ne trovas eĉ unu esperantiston. Ĉu ili ne ekzistas tie?, aŭ ĉiuj malsanas je "bacilus verdus malesperantus?", aŭ ĉiuj mortis? Ne, kompreneble ne, ili bone vivas, dikiĝas, babilas, sed... sed la urba loĝantaro ne scias pri ili, ne scias, ke inter ili estas vigla Esperanto-rondeto. Kaj tial ankaŭ mi vane trapasas urbon, demandas. Finfine mi laciĝas, prenas miajn valizojn kaj forgesas je lokaj esperantistoj. Kaj nun imagu, kia estas mia surprizo (verdire tre agraba), kiam elvagoniĝinte ekzemple en Pardubice, mi legas: Esperanto - informoj ĉe... aŭ en České Budějovice: Esperanto-Klubo Hotel u Slunce, kunvenoj ... informoj ĉe... Tuj mi sentas min kiel en Esperantujo.

Ĉesu oponi, ke via urbo ne havas stacidomon. Nu, poste sekvu la modelon ekzemple en Kašperské Hory. Rekte ĉe la "ĉefa" placo (estas tie nur unu) pendas la verda stelo kaj la indiko: informoj... J. Kotrba, adreso.

Nun certe mokas vilaĝanoj: jes, nur kritiku ilin, por ni tio ne validas. Ĉu efektive? Kial ne meti similan tabulon sur la domon de MN, Klubon de JZD, aŭ almenaŭ sur la ununuran restoracion ĉe strato. Ekzemple en malgranda vilaĝeto apud Ostrava - ĝi nomiĝas Stonava - estas nia informa tabulo kaj ankau montrofeneŝtroj. Certe vi estas pli multaj, sed mi devas ŝpari la lokon.

Kaj kion dirus alveturinta fremdulo? "Bonege, en Stonava mi certe trovas amikojn, sed... ĉu vi hazarde disponas per adreso de esperantistoj el Praha? Rigardu, mi veturas vian ĉefurbon, sed mi ne scias...?"

Nu, mi kredas, ke aspektus tre bele, se en ĉiu urbo aŭ vilaĝo, kie estas esperantistoj, estus simila tabulo. Sed ne kiel en Opava kaj Ostrava (kafejo Fenix), kie estas anoncoj de kluboj jam 10-12 jarojn neekzistantaj.

Ankoraŭ multaj diskutindaj ideoj naskiĝas: Esperanto en telefon-nomaro (kiel en Brno), informoj, per kiuj disponus Turista n.p. kaj simile. Pripensu, proponu,

realigu! La mondo atendas ĉies bonagojn.

via V.V.

-----  
Ekde venonta nurmero aperados en FAJRERO regula rubriko "B-KURSO". Sendu tuj viajn sugestojn!

-----  
La ŝatata MASKOBALO ESPERANTISTA kaj junulara kunveno en BRNO okazos nunjare 27-28.2.1960!

-----  
La peticion pri enkonduko de Esperanto en nederlandajn lernejojn subskribis ĝis la 1.12.1959 608.926 homoj. La kampanjo de nederlandaj esperantistoj daŭras.

## LEKANTETO

PORINFANA PAĜO DE FAJRERO

### EL REMEMOROJ PRI NUNJARA SET:

#### Serĉu trezoron!

Nunjare libertempe mi estis en Esperanta tendaro en Lančov. Posttagmeze ni tie ludis diversajn ludojn. Unu el ili estis serĉado de trezoro. Unufoje posttagmeze foriris la tendarestro kun kelkaj instruistoj kaŝi trezoron. Nia tasko estis trovi ĝin. Ni iris laŭ signita vojo - ni serĉis leterojn skribitajn Esperante kaj per morse-signoj. Tiuj ĉi leteroj gvidis nin al la ruinaĵo de Cornštýn. Sed tie estis tre malfacile trovi la trezoron. Post longa serĉado ni trovis skatolon. Ni estis tre scivolemaj, kio estas en ĝi. La knaboj malfermis ĝin kaj ni ekvidis dukatojn - sed ne orajn, nur ĉokoladajn. Ĉiuj el ni poste ricevis kelkajn dukatojn kiel rekompenccon por nia penado. En la tendaron ni revenis lacaj, sed gajaj kaj kontentaj, ĉar la serĉado de trezoro plaĉis al ni.

Jana Šemberová, 12-jara, Lanškroun

#### La voje to de kuraĝuloj

Unufoje vespere la tendarestro preparis por ni surprizon. Post la taga ordono li diris al ni, ke hodiaŭ vespere ni povos pruvi nian kuraĝon.

Ni trairis malluman arbaron direkte al Lančov, proksimume 200 metrojn longan vojon. Tie estis diversaj "superteraj aĵoj", ekzemple pendigita viro, aĵo, de kiu ni ricevis grandan baton, kaj aliaj objektoj, kiuj timigis nin. Ĉiu trairis tiun vojon sola, do ĉiu streĉe atendis, kio okazos kun li tie. Kelkaj knabinoj, inter ili ankaŭ mi tre timis, kiam ni iris tra la arbaro, ni tre kriis. Sed feliĉe ni ĉiuj travivis tion.

Marcela Jirečková, 13-jara, Lanškroun

Josef Kavka;:  
C I G N O  
(verkita por infanoj dum Kristnasko 1959)

Cigno, blanka cigno,  
birdo eleganta,  
vi ne estas signo  
de fiero vanta,  
sed de nobla digno.

Via neĝplumaro -  
- delikata, mola;  
da flugiloj paro -  
- veloj de jaht' sola -  
sura vastega maro!

Al silent' admonas  
nin rigardo via,  
gajon ĝi ne konas;  
kant' melankolia  
super lag' resonas ...

Ni salutas 18-monatan Margaritan Kavka el Praha (Praha 5, Lužná 7), kiu jam turnas sian atenton al nia Lekanteto. La versaĵon pri elefanto de Onklo Paŭlo ŝi jam scias parkere.

BOLETÍN n-ro 1/1959 – Ant. Al..Nuñez:

"Miaj amikoj miras pro tiu infano ankoraŭ ne kvarjara, kiu kapablas perfekte distingi inter substantivo kaj adjektivo; kaj oni emas supozi, ke se tiu kapablo estus vera, ja la kaŭzo troviĝus en bonkvalita cerbo, pli bonkvalita ol ordinaraj. Sed ili firme venas al la konkludo sole vera: ĉiu ordinara cerbo kapablas pensi logike, kaj Esp-o ne kontraŭas ĝian logikon, sed ĉiam sekvas ĝin. Jen la tuta mistero!"

## **Ekleviĝas sun' matene**

1. Ekleviĝas sun' matene,  
ros' sekiĝas for, ros' sekiĝas for;  
Kasja pelas bovojn paŝti  
dum ĉi frua hor', dum ĉi frua hor'.
2. Kasja, ĉu en domo via  
estas iu gast', estas iu gast',  
/: ke vi tiom frue pelas

bovojn al la paŝt', oj dana,  
bovojn al la paŝt'? :/

3. Ne komprenas vin la gastoj  
lasu ilin nur, lasu ilin nur,  
/: mi elpelas, ĉar ĝi estas  
por mi la plezur', oj dana,  
por mi la plezur' :/

Trad. J. Cink

## El la redakcia leterkesto

- Skribis al ni la prezidanto de UEA, D-ro Prof. Giorgio Canuto: "Dankon pro la sendo de la n. 5 de via Fajrero, en kiu mi legis pri la itala Kongreso en Florenco ... Venontjare ĝi okazos en septembro en CORTINA D'AMPEZO – fama montara restadejo. Ĉu ni havos plezuron gastigi la ĉeĥoslovakajn esperantistojn? Salutojn kaj bondezirojn por Kristnasko kaj Novjaro."
- Ni danke akceptis, kaj recipokas, la saluton kaj bondeziron de la Junulara Fakto de HEK (Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro) en la "Bulteno" 6-8.
- POLA RADIO, Esperantaj Disaŭdigoj: "... La 21-an de septembro ni elsendis mallongan recenzeton pri via, kvankam modesta, sed tamen modele redaktita gazeteto, el kiu informojn ni eluzas."
- S-ro Jerzy Podbielski el Miedzyrzecz (Pollando) sciigis al ni: "La "Fluas akvo" (kanto en la 1-a n-ro de Fajrero) mi en programigos al la de mi gvidata ĥoro en Kampkulturista Mezlernejo, kie ekzistas 30 E-gekomencantoj ..."
- F-ino Vasilka Petrova el Sofio: "Tutkore mi dankas al vi por la alloga kaj ŝatata "Fajrero". Ĝia enhavo estas por mi vere tre interesa..."
- S-ro Josef Balicki el Stonava: "Ni ricevasw nian bultenon "Fajrero" kiel solan Esp. informilon. Pri ĝia tasko sendube ne necesas multe paroli, mi opinias, ke ĝian bezonon ĉiu bone komprenas. Ĉiu gazeto aŭ informilo dependas plej multe de siaj legantoj. La "abonkonkurso por j. 1960" anoncita en la lasta numero, estas tre bona kaj necesa signalo por vekigi inter la legantaro intereson, varbi novajn abonantojn, helpi ĝian eldonadon ... "Fajrero" estas bulteno de Ostrava-regiono, kaj ĉu ni ne povas kontakti kun la najbaraj regionoj, kiel ekz. Olomouc, Žilina?"
- Inĝ. J. Řebíček el Havlíčkův Brod: "Kvankam 51-jarulo, jam delonge mi intencis skribi al vi, nia juna gvardio, por tutkore danki vin pro via bela "Fajrero". - Ĝia enhavo ĉiam alportas al mi multajn interesajn novaĵojn, ĉu de la enlanda, ĉu de la eksterlanda movado ... Mi tre ŝatus, ke Fajrero restu daŭre ligilo inter ni ĉiuj ..."
- S-ro V. Mančík el Horní Němčí: "Akceptu koran saluton pro via riĉe enhava bulteno, kiu tute kontentigas min kaj helpas al mi en nia uzina klubo. "Fajrero" estas sango en Esperanta vivo ..."
- S-ro A. Nydrle el Kladno: "...ĝia varia, per tiom da fervoruloj tiel ofere me kaj celkonscie preparata enhavo instigu ankoraŭ pluajn gesamideanojn al regula abonado por ebligi almenaŭ per tia subteno ĝian daŭran eldonadon..."

■ LA REDAKCIO KAJ LA ELDONA RONDETO DANKAS ĈIUJ PRO LA RICEVITAJ BONDEZIROJ KRISTNASKAJ KAJ NOVJARAJ. SAME NI DEZIRAS AL VI PROSPERAN KAJ FELIĈAN JARON 1960!

## RECENZOJ

### "POŝTMARKOJ DE LA ĈINA POPOLA RESPUBLIKO".

Kompilita de la Ĉina Filatela Kompanio. Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1959, 126 paĝoj. Belega libro, dediĉita al poŝtmarkoj, eldonitaj en Ĉinujo post liberigo en j. 1949.

Unua parto koncize taksas la historian evoluon kaj signifon de poŝta sistemo kaj de poŝtmarkoj en Ĉinujo ekde la 7-a jarcento a.K. Unuopaj ĉapitroj priskribas privatajn poŝtojn tutlandajn kaj poste poŝtmarkojn laŭ 3 periodoj de la ĉina historio inter j. 1928-1949. La tekston akompanas multaj ilustraĵoj, la ĉefa parto de la libro estas opiniata kiel katalogo de p.m. de la Ĉina Popola Resp. Sed, ĉar ĉiuj p.m. estas reproduktitaj, la libro povus bone servi kiel albumo. Tiucele estas aldonitaj eĉ 16 liberaj paĝoj por eldonotaj p.m. Filatelitoj vere ĝuas 4 paĝojn, sur kiuj estas originalkoloraj reproduktaĵoj de tipaj ĉinaj p.m., kaj paĝon, sur kiu estas algluita origina aŭtentika poŝtmarkfolio "Monumento de la popolaj herooj" el 1949 j. La libro estas tole bindita kun surskribo. Ĝia eksterordinara aspekto, riĉa enhavo kaj modera prezo (onidire 6 rubloj) vekis intereson eĉ inter neesperantista filatelistaro (la unua mencio estas en ĉs. gaz. "Filatelie" 1-1960).

Mendebla ĉe: KNIHA n.p., Václ. n. 42, Praha.

VI. K.

"HOMO" – bildkarta serio I., broŝurita, kun bildkovrilo kaj 8 deŝireblaj koloraj bildkartoj. Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio. Mendebla en KNIHA (adr. supre!) La eldonaĵo estas perfekta verko de ĉinaj presistoj. La 8 bildoj de 8 bonaj ĉinaj pentristoj, inter ili Li Hu kaj Ja Ming, estas ŝatinda eldonaĵo, dediĉita al la HOMO.

J.W.

Colette Llech-Walter: "Ekzistencialistaj herooj" - filozofia verko prezentanta la esencon de la pensado de Sartre. Eldonis: "Kultura Esperantista Centro", 5, Quai Vauban, PERPIGNAN, Francio. Prezo: 250 fr.fr., aŭ 8 resp.kup.

### "POLAJ OKCIDENTAJ KAJ NORDAJ TERITORIOJ"

prospekta kajero per teksto kaj bildoj informanta pri la historio kaj nuntempo de pola Okcidento kaj Nordo. Sendis al ni: Zachodnia Agencja Prosowa, POZNAN, Plac wolnosc 1.

"POLSKIE RADIO 1944-1959" - informilo en Esperanto, kiu sur 8 folioj montras 15-jaran evoluon de la Pola Radio de post la hitlerisma okupado ĝis hodiaŭ. Sendis al ni: Pola Radio, Warszawa, Pollando.

MEMORIGAN MEDALON, dediĉitan al la aŭtoro de Esp-o eldonis Pola Esperanto-Asocio, Warszawa, Nowy Swiat 27, Pollando. Aŭtoro de la medalo estas elstara skulptisto J. Goslawski. Diametro 70 mm. Prezo: la bronza 5 us.dol. la arĝenta 6 us.dol. aŭ interŝanĝe por libroj aŭ gazetoj.

ESPERANTO-GRAMAZIKO por hungaroj sur 4-paĝa poŝtkarto estas ricevebla po 0,30 Kčs ĉe: E. Geleta, Nové Zámky, ul. Petöfiho, družstevný dom A.

Samloke: slovak- aŭ hungarlingvaj afiŝetoj koloraj, rotaprinte multobl., por E-kursoj, unu peco: 0,10 Kčs.

FOTOGRAFAĴO: L. L. Zamenhof en Bern 1913 kun la filo Felix. Bela originala fotografajo, mendebila ĉe: Radek Wolkowinsky, Ostrava III, Ĉajkovského 44. (Peco por 2 Kčs).

Kiu povas sciigi ion pri SYPĈENKO IVAN JAKOVLEVIĈ, naskiĝjaro 1897, loĝanta en Ĉeĥoslovakio? Serĉas lin kiaj fratinoj el Sovet-Unio. Skribu al: Andrej SIDOROV, ul. B. Ĥmelnioĝo 10, ĈERKASSY (obl.), USSR

## ANONCETOJ

- Lernejo en Rochester (Anglio) aranĝos ekspozicion de lernejaj gazeroj, revuoj, bultenoj kaj fotoj de murgazetoj. La ekspozicio migros tra pluraj lernejoj en Anglio. La nacilingvajn aŭ Esp. gazetojn sendu kune kun informoj pri la lernejo, junula klubo, E-rondo, kiu eldonas ilin. Rekompence oni sendos lernejan revuon "The Templar". Adreso: S-ro J.R.Jump, Esp.instr., Temple School, ROCHESTER, Anglio.
- Docento Viktor GRUŜKO, Socialistiĉeskaja 169, kv. 4, ROSTOV-DON 6, USSR – dez. trovi koresp. por siaj kursanoj, gestudentoj de univ. kaj inĝeniera-konstruista altlernejo.
- ESPERANTO-RONDETO, Pedagogia instituto "A. J. Harcen", LENINGRAD D-80, Mojka 48, USSR. La membroj dez.kor.kun ĉ.l.pri ĉ.t., precipe kun geinstruistoj kaj studentoj.
- GUTTOVSKIJ J.E., LENINGRAD D-40, Do Vostrebovanija, USSR, - dez.intŝ.alumetietiketojn kun grandaj kolektantoj el ĉ.l. (precipe: etiketoj belgaj, jugosl., japanaj, svisaj, italaj, portugalaj).
- Antonio DENES, Tompa Mihály u. 16, OROSHÁZA, Hungario – dez.intŝ.alumetietiketojn, tutmonde.
- KLUB ESPERANTO, PTR Bobowicko, p-ta Miedzyrzecz Wlkp, woj.Zielona Gora, Pollando – la membroj dez.kor.k.ĉ.l. pri ĉiuj temoj.
- Konrad JAKUBOWSKI, STUPOWO, poczta Zukawiec, pow. Bydgoszez, v.p.Switaj, Pollando. - 17-jara jun.serĉas gekoresp.
- Du POLAJ STUDENTOJ vojaĝos Bruselon trans Ĉeĥoslovakio per AŬTO-STOP. Ĉar ni ne rajtas elporti monon el Pollando, ni volas atingi ĝin per vendado de polaj E-libroj (disko, gazetoj, E-bildkartoj, glumarkoj k.s.) en via lando. Mendu en adm. de Fajrero aŭ rekte ĉe s-ano: Marius Dastych, TORUN, ul. Kraszewkiego 56/7,

Pollando.

-----  
ENIGMA CORSO (daŭrigo): Ni intencas ĉesigi la enigman kurson ekde la 1-a n-ro 1960. Nur en kazo de via granda intereso ni daŭrigus. Bv. esprimi vin!. Pĝ. 23 solvo: PRI MOLA – PRIMOLA.  
-----

NI DANKAS AL NIAJ SUBTENANTOJ: A. Berka, Vsetín – 13; Dr. E. Vančata, Plasy – 13, R. Doležal, Týniště n/Orl. - 13; F. Suchý, Žďár n/Sáz. - 3; M. Novotný, Plzeň – 16; J. Janda, Kolín – 3; K. Krebs, Most – 3; R. Michna, Lichnov - 3; J. Neoral, Nýřany – 13; A. Kodýtek, Nové Město n/Met. - 3; J. Hořejší, Rožmitál p/Tř. - 3, A. Frolíková, Písek - 8; Z. Raška, Klimkovice - 10; A. Sattke, Příbor - 3; E. Boček, Třešť - 3; E. Kutík, Pardubice - 8; J. John, Ostroměř - 8; Z. Minarčík, Oščadnica - 3; Ing. J. Kalný, Jihlava - 3; J. Jestřáb, Č. Budějovice - 8; J. Vrkoslav, Praha - 4; arch. J. Drlík, H. Černošice - 8; J. Novák, Tábor - 8; E. Mácha, Místek - 8; J. Ďásek, Jihlava - 100; S. Douček, Ústí n/Lab. - 3; L. Jahoda, Šumperk - 3; K. Kraft, Obořiště - 8; Dr. A. Pitlík, Praha - 8; R. Podepřel, Karviná - 3; Z. Šmouch, Ostrava - 3; S. Chaloupka, Ostrava - 3; A. Dočkal, Ostrava - 3; F. Večerek, Ostrava - 3; Stavařová, Ostrava - 3; M. Šváček, Střítež - 3; A. Frolíková, Písek - 8; Bartoněk, Poruba - 10; J. Toufar, Brno - 8; V. Kibalčíč, Tichý Potok - 3; A. Odehnal, Městec Král. - 20; J. Johech, Svinov - 3; M. Hapková, Kroměříž - 13; J. Krupička, Brno - 3; O. Křižanovský, Jihlava - 3; J. Sieger, Strakonice - 3.  
-----

Josef Cink: ENIGMA CORSO

Tre interesa estas enigmo, kiun oni povas nomi SAMSONENIGMO (sa-son-enigmo). Fundamento de tiu ĉi enigmo estas fonto de diversaj vortludoj en Esperanto. Ĝi celas vortojn aŭ vortgrupojn, kiuj same sonas. En gramatiko oni nomas ilin homonimoj, sed en enigmado oni donas al ili pli larĝan signifon. Vi scias ekzemple pri jenaj vortludoj:

LITERA TURO – LITERATURO, ĈARM-ULO – ĈAR-MULO ...

Malnova moro slava estas  
BONVENIGI ĈIUN gaston per pano kaj salo,  
eble por montri kiel la MINERAL' UTILA  
estas por nia vivo.

Solvo:       BONVENIGI ĈIUN = SALUTI LA  
              MINERAL' UTILA = SAL' UTILA

Certe vi trovos multajn aliajn enigmobazojn, el kiuj vi formos samsonenigmojn.

OFTE DUM AŬTUNA TEMPO                   PRI BLANKA LEVKOJ' KAJ ...  
NI REVAS PRI INTA PRINTEMPO, JUNA KAJ ETA FOLIO .....



HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA

Renkontiĝis du hundoj. Unu el ili bojis, sed la dua kokerikis. Kial vi kokerikas, demandis la unua hundo. Mi studas fremdan lingvon, respondis tiu.

Novulo en Esperanto-kurso: "Mi jam korespondas kun 25 landoj, do mi decidiĝis aliĝi en la kurson por komencantoj."

SKAN: Ne forgesu:  
Laŭtparola salutado -  
propaganda kanonado!

DAL: (NE KREDU)

SKAN: Devizo por trajnveturo -  
de novuloj dekduo!

DAL: (PREFERE NE!)

Fremdulo en Parizo deziris ekscii la vojon al la teatro Folies Bergère. Li haltis ĉe policisto kaj demandas: "Pardon, monsieur, parlez-vous français?"

-----  
M. Dastych: GEEDZIĜO  
Infero  
sur tero.

FAJRERO estas bulteno de junaj esperantistoj en Ostrava-regiono. Ĉeĥoslovakio. Aperas laŭbezzone.

D E C E M B R O 1959 – n-ro 6.

ELDONAS: ZK ROH Třineckých železáren VŘSR

REDAKTAS: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner (resp.)

RED. ADRESO: Fajrero, Ostrava 15, Na Lachu 6, ĈSR

ADMINISTREJO: Vl. Kočvara, OSTRAVA 8, Kamenec 3.

ILUSTRIS: Inĝ. ark. M. Kalný.

n.k. n-ro T 40153/0